

Téléphone 0-66

Kara korespondanto + kunkongresano.

Dankon grandan por via ŝatinda letero. Ĝi, kiel same, plezurigis min multe des pli viaj leteroj tiun jaron fariĝas pli maloftaj. (Tamen, mia plezuro estus pli granda se viaj leteroj estus tre oftaj.)

Ĉu vi nomis min: "Tout casse k.t.p." ĉar vi pensas ke mi opinias tiele? Se jes, vi tute eraras. Mi nur skribis tion por vi + tute ne por mi. Mi ĉiam faras mian eblon plenumi tion kion mi entreprenis kiel ekz. korespondado.

Sed, mi devas konfesi tamen ke tiu motto la plej ofte estas tute vera - precipe por personoj kiuj ne scias idealigi ĉion. Pro tio ke mi ĉiam idealigas la pasintecon + la neĉeeston, mi restos fidela al rememoro, al ideo, al persono + tiam ne ofte por mi: "tout passe, k.t.p...."

Kiel mi bedaŭras la novan malsanecon de via Eveto. La malfeliĉulineto! Kaj ankaŭ la geparencoj! Kiel ili ĉiam suferas por siaj infanoj + neniam pli malfrue tiuj infanoj estas dankemaj al ili. Nur kelkafoje kiam ili mem estas parencoj.

Feliĉe ke estas la varma (?) sezono + Eva pli rapide povas kuraciĝi!! Tamen sendube la vetero ĉe vi estas kiel ni = depost 6 semajnoj, tute malvarma, pluva, ventega. Hieraŭ estis granda turniro da teniso + pluvegis. Oni tamen (pro fremduloj alvenitaj speciale por ludi) ludis inter la pluvoj. Kiel ĉiam mia filo

2

gajnis. Estis "le championnat du Nord Maritime de la France". La lastan jaron li ankaŭ gajnis tion. Kaj li estas preskaŭ la plej juna. Samtempe li plenumis siajn ekzamenojn en la Universitato en Lille (3-an jaron). Li ankoraŭ estas la plej juna. Li povus esti advokato nun + ... ne estas 20jara.

Mi skribis en mia ĝardeno + hodiaŭ estas preskaŭ bona vetero! Antaŭ mi estas herbejo, mallonge tranĉita + ebena kiel tapiŝo. Ĝi okupas la tuta meza parto de la ĝardeno. Sur ĝi kreskas tri grandaj arboj kiuj pro tro da alteco estis tranĉataj tiun jaron + nun, ili estas iom malgrandaj. Ĉirkaŭ aleo + ĉirkaŭ ankoraŭ florbedoj kun rozoj, lilioj blankaj + flavaj, geranioj, libelioj, begonioj + aliaj. Apio sur la muroj + pirarboj. En angulo, benko, tablo + multaj segegoj kun kusenoj. En bela vetero ni estas ofte tie.

Kiel bedaŭrinde ke vi ne estas tie apud mi. Ni estus multe pli bone ol en Praha. Malpli varme + pli trankvile. Mi memoras tiel bone la epokon kiam D-ro Alex. Zamenhof nia amiko restadis ĉe ni dum 15 tagoj antaŭ ol foriri al Rio de Janeiro. Kiel ni babiladis. Ni uzis ĉiujn temojn!!

Depost 15 tagojn mi spertis grandegan ĝojon + eksciteco. + grandan disreviĝon: ... Mia edzo diris ke ĉar iri al la Kongreso tiel plaĉas al mi ke mi do iru. Mi decidis iri + skribis 15 diversajn leterojn - al Berlino, Dresdeno, Stockholmo, Parizo, Lille + al vojaĝagentoj, amikoj k.t.p. por sciigoj. Multajn mi jam ricevis.

3

Por eviti longan marvojaĝon + por viziti niajn amikojn en Stockholm, mi intencis iri tra iom komplikata vojo = Kalao, Bruselo, Köln, Berlino (kie mi estus ripozinta) Sassnitz, (haveno germ.) al Trelleborg (haveno sveda + nur 4 horojn mare) poste vagonare al Stockholm + restado. Mare ĝis Åbo (12 horojn inter insuloj) + 5 horojn vagonare al Helsinki.

Tre malfacila vojaĝo por virino sola ne sciante germ. aŭ svede. Tamen, mi volis iri + revis belege pri ĉio. Mi vere vivis ĉion pro imago. Sed antaŭ kelkaj tagoj mi sentas min malbone kiel ofte + timante la grandan laciĝon, la ekscitecon pro manko da dormo (mi neniam povas dormi vojaĝante) + la malsimilan nutraĵon + multaj aliaj malfacilaĵoj mi demandis min. Ĉu ĉi-tio valoras? Tiu Vojaĝo - nur la vojo kostus iro + reveno 1800 frankoj. Kaj eble mi estus estinta malsana aŭ disrevigita poste. Sed ... nun ho ve! la sentema, ideala imaganta flanko de mia estaĵo suferas dum la praktika flanko ĝojas pro la mia decido.

Mi estus bezonita 3 "vizas" sur pasportoj kiujn mi estus devinta sendi al la Amabasadorejoj en Parizo germ, Sveda, Finna !!! Ankaŭ mia edzo ĝojas persone ke mi ne lason lin sola unu monaton. Do. sendube ni iros en Alsaco en Sept. eble al Svisujo, eble al la Reno (le Rhein). Ni ne scias. Eble mi iros al la edziĝo de mia frato en Birmingham (Anglujo)

Sed kion mi lernis studante tiun vojaĝon!!! Pri geografio, vojaĝoj, agentejoj, grandaj urboj, hoteloj, delegitoj, k.t.p. Do mi sendube neniam revidos mian amikon en Stockholm. Mi nur vidis lin kiam mi estis 7 jara + li junulo. Li multe estimis mian patrinon.

4

Ho, kiel mi ridetis kiam vi skribis ke sendube mi estas parenco de S-ro Goerlay mortigita de Daguebert (kvankam oni ne devas ridi en tiuj malgajaj cirkonstancoj).

Mi pensis ke vi, kiel fama advokato, vi estus komprenita ke M-e (Majstro, maître por ĉiuj advokatoj) Sergeant reprezentis la familion de la mortito ke estas oficiale kiel advokato de la familio + de la mortito. La familio ne volis "se porter partie civile" (ke mia edzo estu la prosekanta parto) ĉar tio servus al nenio + kostus multe. La mortiginto konfesis + estis preskaŭ certe ke li estus kondamnita al la gilotino. Tiu krimo pasiigis la tutan nordan Francujon + Anglujon ĉar estis antaŭpripensita + kovarde, malkuraĝule farita.

Frapita en la dorso post invito al tagmanĝo. Ŝtelo de 15 000 frankoj. + enterigo en ĝardeno. Poste, D. rakontis, eltrovis historiojn por klarigi la malaperon de Goerlay..

Li iris al ĵurnalejojn + donis detalojn kiel G. forlasis Boulognon + iris al Strasbourg k.t.p. + neniu pensis ke li estis mortiginto. Mi sekvis la afefron + volis ĉeesti la proceson. Lia patro (al D.) + fratino sidis apud mi. Ho! iliaj larmegoj. Tre interesa afero.

Ĉu vi aŭdis pri la honta, ridinda cirkulero de nia ministro de l' Instruction Publique (de publika instruado)? Li malpermesas al ĉiuj Rektoroj de Universitatoj, al la Kolegioj, Liceoj, Gimnazioj instrui Esperanto, li malpermesas ke ili pruntu siajn ĉambregojn al la Esp. grupoj. Jen tion kion faris S-ro Bérard, granda majstro de la Universitatoj francaj!! Lia celo estas protekti la francan lingvon + malhelpi la internaciecon!!! Sekvas, nature multaj artikoloj

5

en ĵurnaloj kontraŭ li + lia ago. Bona reklamo por l'Esp! Francoj volas ĉiam fari tion kio estas malpermesata! Mi mem skribis artikolon por la fama "liberala" ĵurnalo: "Le Progrès civique". Mi ne scias ĉu ĝi presos tion. Mi paroli pri la multaj lernejoj kie oni lernigas Esp. en Germanujo, k.t.p.

Ĉu vi pensas ke se mi sendos malgrandan leteron al vi por Sĉavnik-Župa, vi povos traduki ĝin en Germana lingvo (aŭ la lingvo de la lando) + sendi ĝin al la pastro de tiu urbeto? Mi volus scii kie estas la lasta pastro mia korespondanto. Eble li mortis. Mi estas iom ĝenata peti tion de vi, sed ĝis nun viaj samlandanoj tute ne estis tre afablaj + nenion respondis eĉ kiam mi dufoje sendis monon. Bedaŭrinde mi nur povas sendi francajn P.M. al vi ĉar nature mi ne havas ĉekojn. Sed, eble, vi bezonus ilin iam por ia franca servo. Se vi respondos ke sen ĝeni vin, vi povos fari tion por mi, mi sendos la letereton al vi + la P.M. Dankante vin.

Mi vidas ke vi ĉiam okupiĝas pri Muziko. tio estas en via sango. Daŭru - tio estas tiel bona.

Ĉu via edzino forlasis Esp.? + viaj samurbanoj?

Mi ricevis la novan jarlibron 1922 hodiaŭ - tre interesa.

Oni ĉiam sendas el via lando, al mi, la ĵurnalon "Esperantido". Malbonuloj - mi nur ĵetas post legado en korbeldon.

Mi ricevis leteron de Generalo Sebert (ĉefo de Esp.) hodiaŭ petante min iri aŭ sendi iun en Anglujon

6

al la Kongreso de Paco. Estas iom malfacile pro la terure alta monŝanĝo.

Pli malfrue 8 h vespere.

Mi revenas el Teniso kie mi ludis. Kial do vi ne ludas? Vi maldikiĝus. Ĉe ni la tenisejo estas tre bela tre fama - 350 membroj - 7 ludejoj tre bone zorgataj. Internaciaj turniroj okazas ĉiujare + aliaj regionoj turniroj la tutan sezonon (April ĝis Nov.) Belegaj arboj ĉirkaŭas ĝin + la nivelo de ludmaniero estas tre alta. Ekz: mia filo estas klasita en la 2-a serio de Francujo, kiel ludanto.

Nun, ni vespermanĝos + tuj iros al la Cinema vidi belan filmon. Ni ne ofte iras somere. Vintre, ofte unufojon po semajno. Do, bonan nokton + ĝis morgaŭ kiam mi mi finos.

la 11-an, 10 h matene.

Ho! jen belega tago! Mi ne vidis tion de longa tempo. La filo foriris baniĝi en la maro. Kiel mi ŝatus ankaŭ ĉar mi bone naĝas sed mi ne havas kuraĝon eliri + marŝi + mi nur iros kudri en la ĝardeno. Estas pli ripozante.

Kial vi diras ke miaj leteroj estas interesaj eĉ kiam "tout casse, tout lasse"? Por mi, nenio estas "ĉasita, aŭ pasita aŭ lacigita".

Do, nun mi finas + amika saluto al via edzino, bonan deziron por pli bona sano de Eva + manpremon koran de via korespondantino

Ĉiam same

A. Sergeant

Senkulpigu iun ajn eraron aŭ forgeson. Mi ne havas tempon relegi. A.S.